

LEONTODO

N-ro 38

Bethune neniam konsideras li estis tre entuziasma kaj tutan kaj havis tre fortan responde. Tio estas kvalito de tiu kiu Ni devas lerni de li.

estas plej bona lernejo por ĉiuj. Bethune, de la herooj Vang Ĝi, tuj iras la vojon de Bethune.

GISTINE BATALU

LAŬ LA VOJO DE BETHUNE

de Bethune (Belgio): En la la studenta spirito de Bethune pri si mem estas tre grava le landoj laborantoj en Ĉinio. Ni mem: Ĉu ni havas kuraĝon nia kredoj kiel Bethune? Imperiismo lanĉas lastan militon pri vivmortan militon kontraŭ efektiviĝi ĝian hegemonion super moderna reviziismo volas dividi tiam Bethune sciigos al ni kiel nin sur la postenoj.

sia tuta vivo, Bethune estas na. Lia hieraŭa batalo estas batalo, ni devas batali ĝis la tuta popolo ĝustine tenos sian sorton.

tenisto, ĉiuj partoprenis laboron. Tuj puŝis ĉiuj sinigo kaj triaj faris buloj. Dank' al unu 36 horoj fare de ĉiuj, cimenta bazo de 280 kaj rapide. Tion vidi ke ĉiuj ĉiuj specialise povas vidi tra ili, ke nomon de socialisma

EKSTREME AL L

En septembro de en Barab. Informis de sur la propraj penas la aliajn pe de eksterlando. tis plu permesoj kaj piedoj. por tio, ke ni a esperas havi e apogi ain sur ili. ĉado kaj sur la lui "Kompreneble l fortoj post la st ŝi, ni decidis libe ŝiri la vojon, kiu a surĝinpi altan

to Maŭ Servu al la Popolo kune kun ili. Li as: "Vidu, Prezidanto Maŭ kvazaŭ jam estus inta ĉi tie. Li diris, ke ni alvenis el plej diver anguloj de nia lando. Estas vere, ke ni kvin noj venis el kvar provincoj kaj kolektiĝis kune kun la komuna revolucia celo..." Apena nis siajn vortojn, la aliaj kvar honte klinis pojn kaj ĉiu faris sinkritikon. De tiam po unuigis en malgrandan kolektivon klasa amikeco.

NENIAM FORGESI PRI STILVERKOJ DE PREZIDANTO

La kaŭzo, kial Vang Ĝi

MAJ.

1968

次矛に具体化する大会準備

— オ55回日本大会(札幌)に全力を! —

オ55回日本エスペラント大会のための Organiza Komitato は昨年
来毎月オ3日旺日札幌市大通リテレビ塔ニ階グリルで、おしゃべり会を
かねて開かれてきましたが、最近、時期接近と共に、月2回開催の提
案が出、4月から実施しております。オ3日旺日には今迄通りテレビ塔
にて、オ1日旺日には場所をかえて伺っています。いつも午前11
時からとし、まず大会の打合わせ、そのあと bablado。会議も bablado も
どなたでも出席、発言は自由ですので、遠慮なく御参加下さい。
全員が komitatanoj として、大会準備に全力をあげましょう!

4月7日には オで同僚、komitato, bablado のあと現地の
の S-ano, D-ro オの案内で市内、冬枯れの青葉公園へ promenado。
冬も緑のトクサ 島の群がる木々の梢を眺め、喫茶店 隣園に一般
して別れました。4月21日には恒例のテレビ塔会合、各地から
る名出席、最近の討議内容は、

1. Seoul の Prof. 金形京の件。 外人参加のオ-号の
彼は、金銭問題も解決、入国できそうとのこと。Midori no Mari-
mo に興味があるそうです。

2. Simpozio pri PACO kaj Homaj Rajtoj

UEA (世界エスペラント協会) は国連、ユネスコとの協力を
常に力を注いでいますが、今年の世界人権宣言20周年、
「人権の年」についても、organo でその意義を大いにうった
えています。これに応じて、今大会でも各方面の人々
を報告者として Simpozio pri PACO kaj Homaj Rajtoj を

同くこの提案が東京のSano 伊東三郎からあり、色々考慮の結果、大会プログラムの最尾につけ加えることとなりました。ESP-UJO内外の専門家へ報告者となつていただくため、今交渉中です。

3. 観光案内“北海道” 発刊！

カラー写真11枚、白黒12枚入りの *luksa turisma prospekto* で、北海道観光連盟の版を使います。本文のESP訳は完了。あと広告を入れて印刷にかかればかりになりました。大会参加者に配り、のり（希望者）に60円位で売ることになりましょう。どうぞ *alikondaj amikoj* に送付下さい。

4. Kongreso Programo 具体化。

いよいよ具体的討議に入り、音楽効果、Sapporo Vespero、ダンス、おしおどりなど各担当がとりこんでいます。

5月には小樽と札幌でー

kunsido 予定

5月5日(日) 小樽市花園東3の11

D-ro 山賀 先生にて。【お持ち参のこと】

5月19日(日) 恒例の テレビ塔=階デリル(札幌市大通)

いつでも午前11時から。前半は *Organiza Komitato* として、55回大会の打合わせ、*japane* です速座なくおいで下さい。こゝでは舌巻の資格一言やまいことはいけません。HEL委員会がO.K.として責任をもちますが、出席、発言は全HEL-anojに開放されています。ついでに行われる *babelado* は *lingva ekzerco* を兼ねて *prefero esp-e* ですが、なれない方は、たまたまきいていても、*najbaroj antaŭuloj* が何かと説明してくれるでしょう。「会話にはまだなれないからー」など心配せず、おいで下さい。

Japan Kongreso 成功への布陣を 才32回 北海道大会で!

今年の北海道大会は昨年大会の決定により札幌で、55-a Japan Kongreso の準備を主として用くことになりました。北海道の Esp 運動の発展も、Japan Kongreso の成功も、カギは我々一人の協力です。ふるって御参加下さい。

とき	5月26日 9時 受付開始
ところ	札幌市北1西1 札幌市民会館 3号室
参加費	300円(昼食、写真代共)
	学生 100円
	欠席参加 100円
Programo	大会議事の外、年論、研究発表、余興として horo, teatraĵo など、例年のように各地方会で御用意下さい。
申込先	小樽市奥沢5丁目142 石黒実、又は各地方会、当日会場でも受付けます。

〔会員消息〕

S-ro 野元哲浩 千才高校から 札幌旭丘高校へ転勤
 „ 那須博文 秋山産生館で小牧支店より本社(札幌)へ転勤
 F-ino T出陽子 小牧から 虻田郡厚沢和安町北4西4へ
 S-ro 中西隆嘉 自衛隊東千才部隊から 第4部隊に転属
 (札幌市西15条南16丁目22番地)

Bonvolu kontaktigi, lokoj gesamideanoj!

VIVO KAJ MORTO DE WIEDERBOREN

Orig.C. Conterno Guglielminetti

Trad. Osamu Nada

Tiun infanon ni deziris dum jaroj. Kaj, kiam liaj verd-
-oraj okuloj malfermigis al senvarma suno de februara mateno
, ni pensis, ke li estas vere mirinda.

Ni ne plu estas junaj, kaj enpense ni akcelis la disvol-
vigon de la vivo, kvazaŭ ni povus per nia deziro plirapidigi
lian kreskadon: aliflanke, pro edukaj konsideroj, ni ne vol-
is rigardi lin kiel miraklinfanon, kaj superestimi liajn un-
uajn sukcesojn. Sed mia patrino koro ekstazis kiam li, du-
jara, komencis malpurigi paperfoliojn per akvofarboj (kun
evidenta prefero por akvo); tamen, mia edzo, pli virece, di-
ris: "Nu, ne kredu nun, ke vi naskis pentriston, kaj lavu
al li la manojn".

La afero kun la farboj tamen marŝis. Mia etulo ne per-
dis entuziasmon, tagon post tago: male! "Pentiloj!" li pret-
endis ĉiumatene post kafo-lakto, kaj li restis kvietaj almen-
aŭ dum tuta horo, ĝis la trotis al mi kun folioj en ruĝ-verd-
-flavaĵoj manetoj:

"Vidu panjo, kion mi pentis: tio estas fiŝo, tio vetuilo
tio dometo..."

Kiam li fiere montris al mi bluan makulon kun ruĝaj ape-
ndicoj trairatan de strioj el ne-difinebla koloro, dirante,
ke tio estas maljuna fiŝkaptisto, mi ne rezistis al la tento:
mi enkadrigis la bildon kaj pendigis ĝin en nia salono.
Efektive, inter moderna meblaro tiu gaja kolormakulo ne mal-
indis. Ankaŭ mia edzo, post iom da grumbado pri molkoraj,
patrinoj, akceptis la fakton.

La bona Dio, aŭ la hazardo, kondukis al ni, tiun vesperon
, mian amikino Julian. Julia kaj ŝia edzo estis pretigantaj

「ウィデルボレンの生涯と死」

原作 C・コンテル・ググリエルミニ著
訳 瀬 治

数年の間、私達は友人の子供がほしいと思っていきました。父は父の子が赤毛がかった金色のひとみが、熱のよい二月の朝の太陽にあかるとじわじわと日暮。一人とに事敵な子だこと、思っていたのです。

私達はもう若くありません。思ふに私達が彼の人生の展開を加速させたようです。まるで私達の望みを「けで」彼の成長を止めることができなかったように。でも一ち、父の子の教育のことを考えると、彼を苛跡の子であると思たり、最初の彼の成功をわいからたりしたくはありませんでした。「かし、ひたつになる父の子が紙をいれと水彩画具で遊ぶはじめると、母親としての私の心は有頂点になりました。でも夫は父より賢く、「おれ、おれが画家と生人だのに」と思たりしないで手を洗ってやりなさい。」と云うわけでした。

でも父のことは、父れにけで終りはしなうたのです。私達のわかれい子は毎日に熱中していきました。まるで反対に！「ママ、紙と具をちょうだい！」

彼は毎朝、コーヒー牛乳を飲んだあとに紙具をほしがりました。父はほとんどのいつも、だまを紙具で遊んでいました。赤毛赤毛黄色い絵具でよこ水にちらちらと手に、紙をいれとに型と私の方にちらちらと歩いてくるまでの間は、

「ママ、何とかがいたのみて、こけがあさけな、こけまは、こけあうち」
彼が自慢げに、こけは年寄りの教師だ、と云いながら、いようのよい色の線が交差し、赤い色と白と青い（おの）のようなもの、私に見せてくれた時、私は誘惑に勝つことができませんでした。私は父と客員に入れ、間にかけました。実際、モダンな家具の間では、父の型と色（おの）のしめ、ふいふくも思えました。夫も私の親ばか、と、いくらかぶつづつ云ったあと、父の事実を認めました。

その晩、ユリアが私達の家に訪ねてきたのは、お恵み深い神様の、お導きせられたのでしうか、父れとも偶然だったのだ。

novan domon. Ĝi inspektis la nian per kritika okulo.

"Novaĵo!", ĝi ekkriis.

"La bildo. Tiu bildo. Kie vi kaperis ĝin?"

Nu, Julia estas tre ekvilibra persono kaj admirinde justa patrino. Ĝi neniam estus enkadriginta... Mi hontis.

"En Germanujo", mi rapide elĵetis, turnante al mia edzo peteman rigardon. Mia edzo sentis kompaton al mi, kaj helpe subtenis:

"Jes, dum nia lasta vojaĝo en Germanujo".

"Kaj kiu estas la pentristo?"

Mi pafis, post neperceptebla hezito, parafrazon el la nomo de mia filo:

"Wiederboren".

"Ha", diris Julia, kiu tre kompetentas, laŭ ĝi, pri arto moderna, "mi konas".

Komprenoble ĝi konis Wiederboren. En tiu momento mem, li sidis sur ŝia dekstra genuo kaj gravmieno suĉis ĉokoladon. Mia edzo komencis amuziĝi:

"Tiu bildo apartenas al nova germana skolo. Ĝi prezentas maljunan fiŝkaptiston. Ĉu vi vidas? Ĝi havas sensaciojn... nu jes, sensaciojn..."

Ĝi-foje helpis mi:

"Tiu ĉi skolo, kiun Wiederboren iniciatis, celas doni ne nur superrealajn sentojn de la pentristo, sed la sentojn bildita objekto. Maljuna fiŝkaptisto sentas... nu, la ruĝo estas eksterigo de lia venko-ĝojo en ĉiu taga lukto kun la blua elemento, kaj tiu ĉi brunaĵo... nu... indikas, ke li... ne plu malsatas, ĉar... li mangis la fiŝojn".

"Sed kiel vi aĉetis, kiom vi pagis..."

"Ho, nemulte... Li ne estas ankoraŭ tre konata. Ĉu vi scias, li estis... li estis eta kamparano. Foje li sidis ĉe strato-bordo kaj desegnis sur ŝtono per karbo-peceto... Tiam hazarde pasis... hm... Pablo Picasso".

"Ha!", diris Julia, ravigita, nerekonante la malnovan historieton.

"Kaj Picasso kondukis lin al Parizo, kaj helpis lin", finis mia edzo. Sed mi jam rajdis sur leono:

"Komence li havis pezajn jarojn. Imagu: en frosta manskordo, sen mono, luktanta por sia nova art-koncepto. Feriĉe dum tiu periodo inspiris lin florvendiistino, lia sola morala helpo. Ili ankaŭ ĉikanis kelkfoje. Sed poste ĝi mortis. Ftizo", mi finis, dankante Murger enpense.

しつわ。エリーア夫妻は新しい家とたてている最中でした。彼女は家の中をいろいろと物色する様子目で眺めまわしました。

「あら、又か、どうしたの」彼女が声をあげました。

「なにや?」

「社会よ、どの社会。あなた、どこでんかき手に入れたの?」

「エリーアはおうついた人で、立派な母親として私は敬服していました。彼女らは自分の子供の絵を額にいかけたりはしなかったでしょう、私は恥ぢました。」

「ドイツですよ。」私は夫の方へ肩付けを求め視線を向けながら笑って云い放ちました。夫はがっかりした。と思ったので、私の云ったことを肯定して助けを求めました。

「どう、最近ドイツを旅行した時、買ったものです。」

「ところで誰の作手なんですの?」

私は気づかぬほどにためらったあと、息子の名前を云い替えることを思いつきました。

「ワイデルボーレンよ。」

「あ、あ。」現代絵画に通じていると自負しているエリーアが答えた。

「知っているわ。」

彼女がワイデルボーレンを知っているのは、おかしなことです。その時も息子、つまりワイデルボーレンは、エリーアの若さげにのびやかな顔をしてチョコレートをやめていた人ですもの。

夫は呆れかへしました。

「この絵はドイツの新しい派に属しているのです。これは若い漁師と表わしていますか。わかりますか? 感覚印象……どう、感覚印象を内包しているのです。」

今度は私が助けました。

「ワイデルボーレンの創始によるこの派は画家の現実を超越した感覚ばかりでなく、描かれた物の感情をも表現することと目的としているの。つまり、この赤は、青い要素とともに、漁師の毎日毎日の格闘の勝利の喜びを表現し、この赤色は……ええと……彼がも……うええ、なにと表現しているの。なぜって……彼が魚を食べたからよ。」

「でも、どうやって買ったの? いくらおつて?」

"Ho!", kortuŝiĝis Julia. "Kaj nun?"

"Nun li komencas esti konata. Mi opinias, ke li havas grandan estontecon antaŭ si. Mi pensas, ke, aĉetante lian bildon, ni faris eĉ bonan financon operacion. La valoro de liaj verkoj rapide kreskos", klarigis mi, klopodante forviŝi ĝuste unu el ili de sur mia jupo.

"Mi tre dezirus havi bildon lian por nia nova domo", intermetis la edzo de Julia, allogata de mia lasta frazo.

"Estas malfacile..."

"Kial?"

"Hm...la limo...ĉu vi scias...eksportado de artaj varoj. ...burokratio...permesoj..."

"Sed vi, kiel vi povis..."

"Ni kontrabandis"

"Ho, ĉu ne eblas ankaŭ por ni..."

"Ni vidos".

Julia foriris kun sia edzo. Ankaŭ sur ŝia jupo kuŝis ĉefverko de ĉokoladaĵ fingretoj.

Efektive, "ni vidis", kaj, je festotago de Julia, ŝi ricevis, en digna kadro, verkon kun klara subskribo: Wiederboren 1961. Mia filo baptinta ĝin "ĉevalo ~~gda~~ ganda kun sinjoro supe", kaj al Julia ni klarigis, ke la griz-rozaj makuloj montras la miksitan sentojn de ĉevalo al sia estro, kaj multakva verde estas enhavo de rajdantanimio.

Post kelkaj tagoj, Julia telefonis:

"Aŭskultu, kara, amiko mia deziras aĉeti varkon de Wiederboren. Ĉu eblas...vi farus al mi personan plezuron..."

Tiel komencis vendiĝi la bildoj de Wiederboren. Ni malfermis spar-libreton. Mia edzo malaprobis. Sed mi diris:

"Kie estas trompo? Oni deziras tiajn bildojn: tiajn oni ricevas. Ĉar oni pagas? Nu, la mono apartenas al la aŭtoro; ni ne tuŝas eĉ centimon: kie estas la trompato? Ĉu eble vi kredas, ke nuntempaj kolosoj de pentro-arto agas aliel?"

Post iom da tempo, ni ricevis la viziton de sinjoro Dominiko Drake, art-kritikisto.

"Ĉu mi povas fotografi viajn Wiederboren? Eh? Nur tiun ĉi vi havas? Ĉu ne aliajn?"

いや、どう高くもありませんよ。……彼は手に、それほど知られてい
ませんからね。御存知ですか？ 彼は……彼は貧しい農夫でした。
ある時、彼が道ばたに坐り、木炭のかげらで石の上に絵をか
いてると、その時、偶然にえーと……「パドロー・ピカソ」が通りか
ったのです。」

「まあ、」とユリアは夢みごちで古いエピソードをさも知ってい
るかのようにうなづきました。

「そしてピカソは彼をハリへ連れて行き、援助してやったのです。
夫は話し終えました。でも、もう私はすっかり調子づいてしまいました。

「はじめのうちは、とりやろしい年が経ったのです。想像してごらん
なさいな。凍りつく様な屋根裏部屋、お金はない、彼自身の絵
の構想とたたかいながら……。そんな時期に花売り娘が彼と
はげましてくれたわ。彼のた、た一つの心のなぐさめだったの。彼等
が時には裏切りもしたわ。でも彼女は死んでしまったの。肺病であ
る。の中でムルセルに感謝しながら私は終えました。

「まあ、」ユリアは胸をうたれたようにした。「で、今は？」

「今は彼、知られはじめているわ。私、思うの、彼の前には大
きな未来が開けているんだ。彼の絵を買って、私達は、うまい投資
をしたものだ、とさえ思っているのよ。彼の絵の価値は、どんどんあが
るわよ。」息子がついでにチョコレートの作品をスカートからぬぐいとう
と努力しながら、私は説明しました。

「で、さらに新しい家のために、彼の絵を買いたいのですわ。」
私の話に心をつかまえたユリアの夫君が横から口をいれま
した。

「難しいわ。」

「なぜです？」

「ええ……制限……知っていますか？……絵画の輸入には政
府の許可が……。」

「でも、あなた方は、あなた方はどうしたのですか？」

「私達は密輸入したのです。」

「ほう、私達にもやっていただけませんか？」

「よくみましょう……。」

ユリアは夫君とともに出て行きました。彼女のスカートの上にもチョコ
レートの

Jes, ni havis tutan stokon. Nia etulo ĉiumatene ŝtelis nian plej bonan leterpaperon, aŭ novan libron, aŭ ŝu-skatolon. Mi pensis savi la murojn el la freskoj de Wiederboren.

"Sed tiu germano estas vera talento!", diris Dominiko Drake. "Ĉu vi ne donus al mi pliajn indikojn..."

Ni rerakontis Giotto'an historieton, la Murger'an romanon; ni eĉ aldonis detalojn el la vivo de Van Gogh kaj de Modigliani. Ni klarigis la celojn de Wiederboren'a skolo.

Klera artikolo kun bildoj aperis sur faka revuo. Ne mankis bildo pri Wiederboren: temis pri senkravata junulo dudek kvin-dudeksepjara.

Tiu artikolo ne estis la sola. Postulo pri verkoj de Wiederboren kreskis: ni luis salonon, kaj organizis ekspozicion. Ĉiuj bildoj vendigis. Ni komencis altigi la prezojn. Des pli ĝi kreskis la postulo. Jam tagaj ĵurnaloj publikigis intervjuojn kun Wiederboren kaj fotojn pri li, el kiuj neniu similis al la alia: la aĝo variis inter dudek kaj kvardek, kaj li aspektis jen brunhara, jen blonda, prefere kun barbo, sed kelkfoje sen ĝi.

Kaj, laste sed ne plej malgrave, la ŝparlibreto de ĉia filo atingis rekordajn ciferojn. Ni estis devigataj administri kapitalon konsiderindan; la afero fariĝis riska. Kiamaniere trijara, kvarjara infano povas fariĝi akciulo, nericevinte heredaĵon? Kiaj estas la fonto-gajnoj kiuj ekligas tion? Jes, procento sur la vendaĵoj de Wiederboreb-bildoj...sed ĉu sufiĉas por klarigi...

Iun matenon, mia edzo frontis min:

"Jen la tria letero de germana bildekomercisto kiu insiste demandas la adreson de Wiederboren. Kion ni faru nun?"

Krome, Wiederboren komencis ŝanĝi sian stilon. Anstataŭ largaj strioj kaj makuloj, anstataŭ ne certaj koloroj, jen aperis marionetoj, arboj, domoj. "Kion ni faru nun?", rediris mia edzo senespere.

Tiel ni decidis mortigi Wiederboren. Ni ĵetis al la publiko la novaĵon. Li, ni diris, fine fama kaj agnoskita, fariĝis riĉa kaj komencis diboĉan vivon.

レートをついた小さな指の傑作が、わかれていました。

実際、《ヤシメました》とエリーアのお祝いの日に彼女は、ほきりと《ウイデルボレン 1961》と署名のある、木の額にはいる作品と受け取ったのです。息子は又か「主人と乗せた大きな馬」と題をつけていました。私達はエリーアに「灰赤色」のしめは馬の主人に「対する種り合」の感情と表現し、そして「青い緑色」は乗っている者の心の内容である、と説明しました。

数日後にエリーアが電話してきました。

「聞いてよ、あなた。私の友達が、ウイデルボレンの作品と買いたがっているの。お願いで至るかしら。できればとでも嬉しいのだから……」

そういう具合でウイデルボレンの絵は売れはじめました。私達は息子のために貯金通帳をつくらせました。まあ、2歳にする息子はもう将来のためにお返しはじめたのです。

夫は反対しました。でも私は「どこにどうかがあるの？ みんなウイデルボレンのわいた二人の風景を絵と描いているのよ。父に実際、彼がわいた絵を受けとるのだから。お金を私から取って？ でもお金は作者にはいるのよ。私達は一銭たりと手をつけてないやない。どこに偽りがあるの？ だるいあなたは、現代の偉大な画家は、もとまた振舞いをするでも思っているんじゃない？」

又小からしばらくして私達は絵画評論家である、ドミニコ・トラウチ氏の訪問を受けました。

「あなたたちがお持ちのウイデルボレンの作品と写真にとらせていたに付きませんか？ ええ？ 二人だけなんですか？ 他にはないのですか？」

どうです、私達には彼の作品の全部のストックが、あるのです。私達の坊やは、一番よい複製本、新しい本、くつない木ものなどを盗んでいきました。私達はウイデルボレンの壁画から、壁を守ることに苦勞していました。

「い、このドイツ人は正真正銘の天才だ！」とドミニコ・トラウチ氏が言いました。「もとまた他に知っていることがあったら教えていたに付きませんか？」

私達はツォットク、一生、ムルヤルの小説とまた繰り返して話しました。ヴァン・ゴッホ、モリヤーニの詳細な点、そして……

Virinoj ne mankis. Eĉ trompitaĵedzoj ne. Unu el ĉi tiuj atakis lin kaj batis lin furioze. Li mortis sekve de tiuj batoj. (Verdire, mia ~~ŝia~~ edzo estus preferinta sinkopon: pli laŭmode, li opiniis. Sed mi elektis am-vengon: pli romantika, mi diris.)

Nekrologoj aperis en gazetoj kaj revuoj: oni rerakontis la mallongan vivon de Wiederboren, oni plendis, ke tiel alta genio ne povis doni aliajn ĉefverkojn, oni konjektis pri evoluo de lia arto, de de lia skolo, se li estus pluvivinta. Tagĵurnalo publikigis oĉ kliŝon pri funebro. Alia, intervjuon kun la florvendistino de liaj fruaj jaroj: Ŝajne, ŝi ne mortis pro ftizo, sed farigis intertempe itala grafiĉo. Iom post ion, tamen, la morto de Wiederboren komencis malhavi intereson de ĵurnalistoj, kaj, kiam la Tour de France staris, ni pensis ke ni fine liberigis el Wiederboren, el liaj bildoj, el la mono-pluvo kiu farigis embarasa...

Nur unu aferon ni ne anotaŭkalkulis.

Kun la morto de Wiederboren, la valoro de liaj verkoj dekobligis.

El "Revuo Esperanto"

*** *** *** *** ***

白比さんのおもいで

星田淳

昨年4月、S-ro Sidorowiczの旅行について来た教通ったのが最後になってしまったが、彼と知合ってから、早いもので15年たっている。あの時は名古屋に彼はいた。満州帝国時代の話、中東まかり批判していた。次に会ったのは富山の日本大会(1961年)だったろうか。彼は、そのときMEMの分科会で「ソ連は赤色帝国主義だ」と主張。松阪の吉村氏らと論争したそうだが。この時私は彼にすすめられMEMに入ったが、現在に至るもnur abonantoで、時に会費切れで自然股退...となると、毎度彼からいがみで丁寧な、会費支払いをすすめられ、何とか現在に至ったが、実に細かい、暖かい、おかしやりのある人柄だった。米ソ両国が盛に核実験をやっていた時、彼はPACO(MEM機関誌)上に、両大国に訴えるアピールを出し、あらゆる核実験の停止を主張した。当時政界関係などに、ソ連の核実験を弁護するグループもあり、MEM内でも彼の訴えに対して反論が出た。その後すぐ彼は日本のMEM支部代表をやめたが、この問題も原因のような気がする。あの反共一徹とみえた彼が、後EL POPOLA ĈINIOのperantoとなり、中国訪問をした。思想変化の原因を知りたい気がする。次の短歌はS-ro 富田敦夫のうた。同感。

カマラード白比と果てにし君を呼ぶ、エスペランティストわれの無為なる。

かえました。私達は、ウイデルボレンの派のわがやについて説明
しました。

学識のある記事が、絵と一語に専門の機関紙にのりました。
ウイデルボレンと描いた絵もものっていました。父は25歳から27歳
ぐらいのネウタイをしいない青年でした。

父の記事は一つだけではありませんでした。ウイデルボレンの作品
をほしがり人々をふえていきました。

私達はサロンと借り、展覧会を開きました。絵は全部売れてしま
いました。私達は値を上げはじめました。ますます、絵に対する要
求はふえました。日刊の新聞はウイデルボレンの談話や写真と発表
しました。父の父も二れもが「うちうちの」もので、ちよと似てはいませ
んでした。年齢は20歳から40歳ぐらいの間で、髪は茶色であたり、
ブロンズであたり、ちげとはやにいろものが多かったので、時には
けられていないものもありました。

とうとう息子の貯金は記録的な数字に達しました。これは問題
です。私達は相当な額の資産と管理しなければならなくなった
のです。事は危くなりました。どの様な方法で、3、4歳の子供が
遺産を受けとりもせずに、株主になることができるのでしょうか。父は
可能にしたいという源はと父のものではない。父は、ウイデルボ
レンの絵と売った歩合で………でも説明するに充分ではないか。
ある朝、父が私に向かっています。

「この3通の手紙はドイツの画商からきたものだが、どうして
ウイデルボレンの住所と教えてくれ、と書いてきている。一体、どうするん
だ？」

ところでウイデルボレンは父のスタイルをかえはじめたのです。
幅の広い襟や、しみのかわりに、不明りょうな、色のかかりに、人形や、木
や、家を描くようになりました。「一体、どうするんだ？」父がまた絶
望的に言いました。

というわけで、私達はウイデルボレンと殺してしまおうと決心
したのである。彼はとうとう有名になり、認められ、金持ちになつて生
活が乱れはじめた。女に不自由なことは、やがてしださされた
夫たちもたくさんいた。父は著者の一人が、彼と赤い、怒り、後
を袋だたきにした。父はもとで彼は死んでしまったのだ、(案

を云うと、夫は最近の芸術家らしく、行き話で自殺した、とした方がいい、と思ったのでしょうか、私はよりロマンチックに、と夢情のつめから殺されたことにしたのである。と、作り話のニコースと私達は世間に投げかけました。

死亡記事が雑誌や機関紙にのりました。人々はワイテルボレンの短い生涯を語りかえし、これほど偉大な天才が、もう傑作をかくことは出来ないのだ、と訴えました。世間の人々は、彼が生きていたのと彼の芸術の発展と、彼の派について推測したりしました。新聞は華式の写真さえ、のせました。他に彼の初めの頃の花売り娘とのイタビュースのせた新聞もありました。彼女は肺病で死んだのではなく、イタリアの伯爵夫人にやっていたのです。

でもだんだんと新聞記者達は、ワイテルボレンの死に興味を特になくなりました。そしてフランスに塔がたてた時に、やとワイテルボレンと、彼の絵や当惑させられたお金の雨から自由にやったのだと私達は胸をぼぞあらしめました。

たばこ一つだけ思ってもみなかったことがあります。

ワイテルボレンの死によつて、彼の作品は10倍も値上りしたのである。

* * * * "Revuo Esperanto" 第1号 * * *

[Lingva atentigo] Reveni は「帰る」ではない!?!

A, B は日本人、C は外国人、事務所で話こんでいたが、もうそろそろ引揚げ時、夕方です。A は、「帰ります」といつつて……

A: Do, mi revenos.

C: ?

B: Ni baldaŭ forlasos ĉi tiun ĉambron. Ne revenu, mi petas. Ni baldaŭ fermos la pordon.

A: ?

「新撰エス和」(国本)で「帰る」を *reveni* としたため、こんな誤りを、相当のベテランでもよくやっています。 *reveni* は文字通り、*re+veni* (再び来る)で、上の例の場合、A は「また二にわたります」の意味、こんな時 A は、*Mi iros hejmen.* とか *Mi devas jam foriri.* といえはよかったです。B に説明(助け舟)を出されても *reveni* は日本語の「帰る」と同じだと信じている S-ro A には通じなかったわけです。これは「Esp. 会話再入門」福田三男著に実話として出ています。 — 14 —

Ĝis la 「原生花園」

Asamu Kadal.

diversaj aferoj ĉagrenis min.

Senkaze mi estis melankolia ĉiam

Sur la blua kanvazo, la melankolio de vivado, estis pentrita la intensa koloro, ekzemple, ĵaluzo, malamo, perfido, malkredo, memmalamo, ktp. La fono de mia peko ne malaperis. male! Ĝi fortiĝis pli kaj pli.

Mi decidis vojaĝi

Eble mi povas forgesi melankolion iom da tempo.

Jes, bone, nur iom forgesi. Estas maleble forgesi tian senton perfekte.

Laŭ la konsilo de kunopaj knabinoj el Tokio, tiujn mi renkontis. Ĉe la lago 知床五湖 en nebulo, mi elautobusigis ĉe 浮小清水.

Mi sciigis al ili la kanton "Al amiko fora" (18307. 2に), kaj ankau ili rekompence sciigis al mi iun kanton "旅の思い出".

18307. 18307.

旅は 終りました.

また 来. 次の日まで

いつか 思い出 することです.

.....

Kiam la autobuso proksimiĝis al 18307 refoje, mi kantis ĉi tiujn kantojn po unufoje, kaj mi adiaŭis preĝante reciproke ke nia vojaĝo estu senokcidenta.

Mi komencis piediri sur la nacia vojo, sed baldaŭ mi ŝanĝis en malvastan, kactan vojon,

trans fervoj, inter la fervoj kaj la maro
Aŝoka.

La pejzaĝo tie forte kaptis mian koron.

Ruĝa estas 紅, 紅, 紅,

Oranĝa, 橙, 橙, 橙,

purpura, 紫, 紫, 紫.

flava estas 黃, 黃, 黃. Ili ensaltis mian
koron kun forta neforgesebla impresso.

Mina povis premi la pacion, kin fontis el mia
koro, kaj mi krietis.

Ne vidigis de tie la maro, la fervoj, kaj la
nacia vojo, sed aŭdigis muĝo de la maro, kin
daŭras monotone, solece, kaj kelkfoje fajfilego
de vagonaro kin ploras muzere.

紅, 紅, 紅 estas ruĝa lamente, kaj floris ĉie ĉirkaŭ
mi. Mi staris en floroj. Mi kontentis, sentis

min felica, kvankam ĝi daŭras ne tre longe.

Se estas permesite, mi volis alparoli ilin,
kaj kisi unu post aliaj portante ilin en la
brakoj.

Kelkfoje mi grimpis la dekstran monteton,
kvazaŭ mi rememoris tiun agon, kaj rigardis
la maron.

Severaj ondoj de la maro Aŝoka, montris al mi
blankajn dentegojn sur la norda ĉielo melankolia.

Momente la tempo haltis, kaj mia koro ekflugis
libere super la florgardeno.

"Ho, eble ĉi mi povas daŭre vivi sentante
fajron interne!" Pensante tiel, mi ridetis.

Kiam mi atingis la stacion "原土花" post
almenaŭ du hora piediro, mi vidis tie multe
da homoj kinj venis tien per aŭtobusoj aŭ

propraj aŭtomobiloj.
Ili grimpis monteton, trovinte la florojn
kiuj almenaŭ mortis, ili ridegis, kriis, kaj
krisis.

Rigardante la anonctabulojn pri floroj,
ili ekĝemis.

Eble post la vojaĝo ili parolis al siaj gekonatoj
fermiene. "Mi vidis florojn de la 花王花王"

Imagante tion, mi sentis malagrablon.

Nur mi, mi kaj la kvaropaj knabinoj, kaj
altaj personoj kiuj piediris la malvastan
vojon, havas rajton diri tion, mi pensis.
Kaj dirante tion, sed rigardante ilin
kun mokridomieno, mi preterpaŝis inter
ilin

"El mia lastatempa vojaĝo"

** ===== **

VORTOJ DE S-RO SIDOROWICZ (Daŭrigo de p.25)

--Mi laŭdas ŝian belecon, laŭdas ŝian bonkorecon. Aŭ
faras toston kun ia politikaj sencoj aŭ io alia. De mi
havas eblecon paroli en propraj vortoj pri io ajn. Kaj
bedaŭrinde japanaj esp-istoj ne havas tian eblecon.

5) "eterna komencanto" は 何人か 自慢か?

Kelkaj japanaj samideanoj diris, en sinprezentado japa-
naj esp-istoj diras, ke ili estas eternaj komencantoj,
ĉar ili estas tiel ĝentilaj, ili volas humiligi sian per-
sonecon dirante tion. Kaj mi diris, ke se ili estas tiel
ĝentilaj tro, pli bone diri, ke ili estas tiel maldili-
gentaj, tiel mallertaj, tiel mallaboremaj---. Tamen ili
diras, ke ili estas eterna komencanto kun certa fiero.
Mi observis en iu kunsido, unu homo sin prezentis bone
en esp-o kaj ne ricevis tiom da aplaŭdo, kiel tiu, kiu
parolis japane kaj diris, ke li estas eterna komencanto.

こうして文に書いてみると、かなり無駄な言葉のくり返しが多いのになぜか。
というのは、金語や、話しことばの場合当然のことだろう。世帯省略した
ところもある。文法的には必要な *ke* や、関係代名詞の省略も多いが、
話しことばとしての *esp*、が文語 *esp* から少しはがって来た部分とも考えられる。

Hokkajdo

Hokkajdo, kuŝanta inter $41^{\circ}30'$ kaj $45^{\circ}31'N$, estas la plej norda de la Japana Insularo. En latitudo, Sapporo, la ĉefurbo, respondas al Marsejo, kaj Hakodate, la suda pordo de Hokkajdo, estas iomete pli norda ol Novjorko.

La tuta areo de Hokkajdo estas $78,509\text{km}^2$, ĉ. 21% de Japanujo, el kiu 76% ($59,364\text{km}^2$) estas arbaro. La nombro de loĝantoj estas 5,172,000 en junio '66, kaj homa denseco estas 66 por km^2 .

Hokkajdo, proksima al la norda limo de mezvarma zono, havas malsekan kaj malvarman vintron. La klimato estas ofte komparata kun tiu de la norda parto de Nordameriko, la suda parto de Kanado, kaj nordeŭropaj landoj.

De la ŝtona epoko, en Hokkajdo vivis diversaj triboj, el kiuj la plej potenca kaj konata estis la aina. En 1869, al tiu insulo, ĝis tiam nomita Ezo, oni donis novan nomon "Hokkajdo", kaj metis Kolonian Komisiiton tie laŭ la modernigita plano de ĵusnaskita tutlanda registaro. Laŭ la plano de Horace Capron kaj multaj agrikulturaj teknikistoj, senditaj de Usono, laboris por konstrui modernan Hokkajdon enkondukante grandskalan farmsistemon. Ankaŭ la urbo Sapporo, kie la stratoj ofte kruciĝas kun la aliaj, estis konstruita kunlabore de tiuj usonaj specialistoj.

Dum cent jaroj pasintaj de tiam, Hokkajdo ŝanĝis sin de forgesita sovaĝa foro al nuna moderna kaj viveca insulo kun kvinmiliono loĝantaro.

La industrio en Hokkajdo ampleksas fabrikadon de papero, pulpo, ŝtalo, ŝipoj, kemiaj sterkoj, betono, biero kaj fiŝaĵoj el nordmaraj fiŝoj, forst-, riz-, frukto- kaj legomkulturadon, bredadon kaj karbminon.

Ankaŭ por turistoj Hokkajdo estas vera mekko kun diversaspektaj naturaj fenomenoj, faŭno kaj floroj de unikaj specoj. Ĝi havas kvar naciajn parkojn, Ŝikocu-Tooĵa, Dai-secuzan, Aken kaj Ŝiretoko, kaj vic-naciajn kaj dek unu guberniajn. Multaj banlokoj, lagoj kaj montoj, kie ankaŭ en vintro oni povas ĝui skiadon kaj glitadon, ja prezentas ĉiusezonan feriolandon.

Hokkajdon oni povas atingi dum unu horo de Tokio per regula jet-aerplano. Do oni diras, ke la skiejoj apud la lago Ŝikocu estas la plej proksima de Tokio, ĉar atingi tiujn en Kantoo oni bezonas pli longan tempon per surtera trafiko.

Fotoj

- (1) Festivalo de neĝo kaj glacio en Oonuma Parko.
- (2) Festivalo de Oĥocka marglacio
- (3) Kitenomine Nacia Skiejo en Furano
- (4) Bunta vintra festivalo en Asahikaŭa (Asahikawa)

HAKODATE (253,000 enl.), la enirpordo de Hokkajdo, estas ideala natura haveno unue malfermita por komerco kun alilandoj en 1859 kune kun Jokohama (Yo--) kaj Nagasaki. Abundas vidindaĵoj kaj historiaj lokoj ĉirkaŭ la urbo.

MONTO HAKODATE (alt. 334m.) donas grandiozan pejzaĝon de la urbo al la vizitantoj. La belega nokta sceno, kiun oni povas ĝui sur la pinto, estas vaste konata. Tien regule kuras busoj de aprilo ĝis la mezo de novembro.

GORJOKAKU (GORŬO), pentagona kastelo, nomata tiel pro sia formo, estis konstruita en 1865 laŭ eŭropa stilo. En 1868 ĉi tie okazis la fina batalo inter Meĵi-registara kaj ŝoguna armeoj. Tiu historia konstruaĵo estas registrita kiel "Grava Kultura Propraĵo". Proksima de la tramhaltejo Gorjookaku-Koen-mae, 10 min. de Hakodate stacio.

TRAPISTA MONAĤINEJO, 40 min. de Hakodate stacio aŭ 10 min. de Junokaŭa stacio per buso, estis fondita de ok francoj en 1898 kaj havas pli ol cent monaĥinojn. Sur la proksima monteto floras konvaloj pure blankaj en frua somero.

JUNOKAŬA VARMAFONTO estas kvieta kuracloko apud Macukura Rivero kaj frontanta al Cugaru Markolo. Sur la najbaraj montetoj floras amindaj konvaloj en frua somero.

OONUMA VIC-NACIA PARKO entenas tri lagojn de Oonuma, Konuma kaj Junsainuma (Zyun-). La apuda vulkano Komagadake donas multon al la belo de la pejzaĝo. Plej ĉarmaj estas la freŝa verdo en somero kaj la bunta aŭtuna foliaro ĉirkaŭ la lago. En la lagaro, kies bordo longas je 34 km., troviĝas multaj insuletoj kun arboj, sur la bordo staras fantaziaj rokoj, kiuj donas unikan ĉarmon al la sceno. Kuŝanta 27 km. norde de Hakodate, 134m. alta super la marnivelo, tiu parko estas ja ideala somera libertempejo.

ESAN GUBERNIA PARKO estas sur marbordo de Oŝima duoninsulo konata pro grandegaj rokoj sur bordo kaj riĉaj alpaj floroj sur la monto. Monto Esan estas aktiva vulkano, ĉirkaŭ kiu troviĝas multaj varmafontoj.

Fotoj

- (5) Kamomejima(Mevo-insulo) en Esaŝi/Hijama Gubernia Parko
- (6) Esan kaj Hiura Lumturo/Esan Gubernia Parko
- (7) Oonuma kaj Komagadake/Oonuma Vic-nacia Parko
- (8) Rigardo sur Monto Hakodate/Urbo Hakodate

⑥ SAPPORO(885,000 enl.) estas la politika kaj ekonomia centro de Hokkajdo. Tie sidas multaj ŝtataj kaj guberniaj oficejoj, firmaoj, kompanioj k.a. La bulvaroj Oodoori estas bone konata pro la freŝa verdo kun buntaj floroj en somero. La sezonaj allogaĵoj de Sapporo estas multaj kaj diversaj; Lilak-festivalo en printempo, piroteknikaĵoj kaj Niktereŭto-Festivalo en somero, Nega Festivalo kaj Karnavalo Surglacia en vintro estas ĉefaj el ili.

HOKKAJDA UNIVERSITATO estas konata pro la vasta areo kun poplara bulvaroj, ulmoj kaj busto de D-ro W.S.Clark, kiu donis spiritan bazon al la universitato.

HORLOĜA TURTO estas fama ekzercloko de Sapporo Agrikultura Kolegio, nuna Hokkajda Universitato.

MOTANIKA ĜARDENO de la Univ., havas areon de 13.5 ha., kie oni rezervas parton de la virga arbaro de malnova Sapporo. Ĝi tri mil specoj estas transplantitaj de diversaj lokoj de la mondo.

BANLOKO JOOZANKES, 30,6 km. de Sapporo, sur bordoj de Tojohira Rivero, en ĉiu sezono akceptas multajn turistojn, kiuj ĝuas freŝan verdon en somero, buntan foliaron en aŭtuno kaj skiadon en vintro. Ĝi apartenas al Ŝikocu-ŝoĝa Nacia Parko.

OTARU(205,000 enl.), unu horon da veturo de Sapporo, estas unu el la plej bonaj havenoj sur la bordo de Japana Maro. Ĉirkaŭ la urbo troviĝas multaj lokoj por turistoj kiel jene.

OTARU AKVARIO(en Ŝukucu), 20 minutojn per buso de la urbo, troviĝas sur la bela bordo de Ŝukucu. La akvario kun multaj basenoj kaj kuvoj por fiŝoj kaj marbestoj, roko-ĝardenoj k.a. estas la plej granda en Oriento, oni diras. Ĉirkaŭ Ŝukucu troviĝas roka bordo, kie oni povas ĝui naĝadon en bela akvo kaj jahtveladon.

BANLOKO ASARIGAWA, 30 minutojn de la urbocentro per buso, situas en aminda valo, kiun kovras freŝa verdo en somero kaj blanka neĝo en vintro.

OTAMOI MARBORDA PARKO, 24 km. de la urbo. Konata pro rokegoj.

TENGUJAMA estas fama skiejo kun kompletaj ekipaĵoj.

FOTOJ

- (9) Lago Tooja en aŭtuno/Ŝikocu-Tooja Nacia Parko
- (10) Rigardo sur Nakajama Pasejo/ "
- (11) Ŝigokudani(Infera Valo) en Noboribecu/ "
- (12) Banloko Ŝoozankej/ "
- (13) Sabropenda roko en Rajden

MURORAN(180,000 enl.), sur krestoforma Etomo duoninsulo estas bona natura haveno kaj konata pro la vigla kome kun alilandoj. Kun grandaj fabrikoj por fero, ŝtalo, tono kaj olerafinado, Muroran formas la centron de la industrio en Hokkajdo. Sur la suda marbordo de Tokkai 6 km. longa, staras klifo 100 m. alta. La du turismaj ŝoseoj sur la pacifika bordo, unu al Ĉikjuu(Tikyû) kaj la alia al Monto Sokurjoo(-ryô), prezentas agrablajn veturon kun pejzaĝo kun klifoj kaj kavoj formitaj de erozio de la Nigra Tajdo kaj la vulkanaj erupcioj.

TOMAKOMAI(90,000 enl.), 74 km. sude de Sapporo, estas viveca industria urbo sur pacifika bordo. Konata kiel "Urbo de papero" ĝi havas du grandajn paperfabrikojn Ooĵi(Ōzi) kaj Kokusaku en si. El ili Ooĵi fabriko konstruita en 1909, post senĉesaj kresko kaj renovigo, produktas ĉ. 1600 tunojn da papero ĉiutage. La nova haveno, konstruita per unika maniero fosi sovaĝan herbejon per maŝinegoj, jam plenumas gravan rolon por enporti varojn en Hokkajdon kaj eksporti karbon en granda kvanto. Granda industria zono estas nun formata ĉirkaŭ la haveno. Okcidente de la urbo troviĝas aĉa vilaĝo rekonstruita apud lageto Poroto en Ŝiraoi.

ŜIKOCU-TOOJA(SIKOTU-TÔJA) NACIA PARKO: Situanta en la mez-suda parto de Hokkajdo, tiu parko, 98,660 ha. en areo, havas diversajn tipojn de vulkanoj kaj kalderoj, lagoj kun diversaj scenaj elementoj kiel arbaroj, varmafontoj k.a. Lagoj Ŝikocu kaj Tooja estas du el la plej grandaj gemoj de tiu parko. El la vulkanoj ĉirkaŭ la lago Monto Jootej(Yôtei) estas la plej konata en la nomo "Ezo-Fuĵi" pro sia eleganta formo. Notindaĵo estas ankaŭ la Monto Tarumae apud lago Ŝikocu pro sia lafa monteto la kapo kaj Monto Ŝooŭa Ŝinzan(Syôwa Sinzan) formita en 1944.

LAGO ŜIKOCU(76 km² en areo), 23 km. norda de Tomakomai, estas unu el la plej belaj lagoj en Hokkajdo, konata pro multaj trutoj, kiuj tiras multajn hokantojn en somero. Ĝi estas ĉirkaŭata de vulkanoj Tarumae, Fuppu

kaj Eniŝa(Eniwa), kiu lasta havas kelkajn varmafontojn kun hoteloj ĉirkaŭ si.

LAGO TOOJA, estas tipa kaldera lago kun centra montareto Nakanoŝima kiel insulo. Apud la lago troviĝas multaj varmafontoj kaj nova vulkano Ŝooŝa Ŝinzan.

BANLOKOJ: En la parko troviĝas multaj varmafontoj. Ankaŭ krom ĉirkaŭ la lagoj Ŝikocu kaj Tooja, troviĝas multaj banlokoj, el kiuj la plej konata estas Noboribecu kun malnova kratero Ŝigokudani. Tie estas multaj hoteloj, kie ne mankas ankaŭ diversaj amuzaĵoj. Sur Monto Ŝihoorej oni montras alin vilagon zorge rekonstruitan kaj ursan ĝardenon, kie vivas kelkdek brunaj ursoj, trovataj nur en Hokkajdo, Saŝalino kaj Kurilaj Insuloj.

Fotoj

(14) Kabo Erimo/Erimo Gubernia Parko

(15) Tokaĉidake Skiejo en Biei

(16) Lago Nukabira/Daisecuzan Nacia Parko

(17) Lago Ŝikaribecu/ "

ASAHIKAWA(-KAWA)(265,000 enl.), situanta en la centra parto de Hokkajdo, prosperas pro siaj abundaj agrikulturoj kaj lignaj produktaĵoj. Ĝi estas la centro industria kaj kultura en centra Hokkajdo. Riĉa akvo de Rivero Iŝikari donas riĉan rikolton de rizo en Kamikaŝa Ebena ĉirkaŭ la urbo. Pro la ligno el Daisecuzan Montaro prosperas ligna kaj pulp-papera industrioj. Ĝi estas ankaŭ unu pordo de Daisecuzan Nacia Parko.

Aina vilaĝo en Ĉikabumi, en okcidenta parto de la urbo, estas loĝata de kelkaj ainaj familioj. Tie ili vendas diversajn memoraĵojn pri aina vivo kaj aŭdigas legendojn de maljunuloj. En Araŝijama Natura Parko estas kelkaj modeldomoj konstruitaj tiel, ke la vizitantoj povus havi la konturon kiel ainoj vivis en sia tempo.

DAISECUZAN NACIA PARKO: Tiu parko, situanta en la mezo de Hokkajdo, estas la plej vasta de la naciaj parkoj en Japanujo. Ĝi okupas la montaran regionon nomatan "La tegmento de Hokkajdo" kun tuta areo 231,929 ha., kiu enhavas tri grandajn vulkanarojn Daisecu, Tokaĉi kaj Ŝikaribecu, kaj Montoĉenon Iŝikari. La parko estas konata pro la altaj montoj kovritaj de virgaj arbaroj koniferaj, multaj belaj valoj kun akvofaloj kaj bone ekipitaj banlokoj. Vizitantoj al tiu distrikto povas observi diversajn vulkanajn fenomenojn, aktivajn, eksajn, ŝildovulkanojn, laŭajn fluojn, vaporejojn, kaj unikajn

karakterojn de tiu norda zono kun vasta arbaro kaj alpaj floroj. Ĉirkaŭ du mil metrojn altaj estas la montoj, el kiuj la plej alta estas Asahidake, 2290 m. En tiu distrikto troviĝas la fontoj de du grandaj riveroj en Hokkajdo, Išikari kaj Tokaĉi.

BANLOKO SOOUNKJOO(SŌUNKYŌ) sidas en la fundo de kanjono farita de rivero Išikari. Ambaŭ flankoj de la kanjono estas vertikalaj klifoj kun kelkaj akvofaloj kaj gigantaj rokegoj. Ĝi estas unu startopunkto por grimpi la Montaron Daisecuzan. Inter hoteloj kaj vendejoj troviĝas Sooukjo-Muzeo, kiu montras materialojn pri topografio, geologio kaj vivaĵoj en ĉi nacia parko.

BANLOKO TENNINKJOO(--KYŌ) kuŝas sur la supra parto de Rivero Ŝumbeĉu, en la fundo de kanjono simila al Sooukjo. Estanta sur la sudokcidenta flanko de Monto Asahidake, ĝi servas kiel okcidenta enirejo al Daisecuzan. Proksime de tie staras Akvofalo Hagotomo, alta je 250 m.

ŜIROGANE estas paca banloko ĉirkaŭita de natura arbaro, kuŝanta sur la bazo de Monto Tokaĉi kaj ĉe la supra parto de Rivero Biei. Tie oni havas grandiozan pejzaĝon de Montoj Tokaĉi, Biei, Biei-Fuji. Ŝirogane servas ankaŭ kiel bazo por grimpi tiujn montojn, kies deklivoj formas unu el la plej bonaj skiejoj en Hokkajdo.

Fotoj

(18) Gensei Kaen(Natura flora parko)/Abaŝiri Vic-nacia Parko

(19) Montoj de Ŝiretoko/Nacia Parko Ŝiretoko

(20) Maŝuu(Masyū), la lago de mistera belo
/Akan Nacia Parko

(21) Roka bordo de Insulo Teuri/Teuri-Jagiŝiri
Gubernia Parko

(22) Rebun, la insulo de norda ekstremo
/Riŝiri-Rebun Vic-nacia Parko

KUŜIRO(188,000 enl.), konata bazo por fiŝistoj al norda maro, estas ankaŭ komerca haveno kaj industria centro de la sudorienta parto de Hokkajdo. Multaj ŝipoj kaj maristoj, karbmino, paperfabrikoj kaj aliaj industrioj donas unikan viglon al la urbo. Okcidente de la urbo estas natrueja parko de tanĉoo-zuru(rugkresta blanka gruo), kiun japanoj amas pro la eleganta belo kiel simbolon de longviveco. Nun oni protektas ĝin.

ABAŠIRI(48,000 enl.) estas la plej granda urbo sur la bordo de Oŝocka Maro kaj prosperas kiel fiŝista centro. Ĝi estas ankaŭ bazo por vojaĝo al Gensei Kaen natura florparko kaj Duoninsulo Ŝiretoko.

OBIHIRO(123,000 enl.) estas vigla komerca kaj industria urbo en la centro de Tokaĉi agrikultura distrikto. Kun la montaroj de Daisecuzan, Tokaĉi, Akan kaj Hidaka sur sia fono, la Tokaĉi Ebena prezentas grandiozan pejzaĝon al turistoj.

NACIA PARKO ŜIRETOKO kovras la pitoreskan distrikton de Duoninsulo Ŝiretoko, sin etendanta en Oŝockan Maron. En la areo de 41,375 ha. ĝi enhavas vulkanan montoĉenon kun tri pintoj, t.e. Ŝiretokodake, Ioo kaj Rausudake. Ĉe la piedo de la montoĉeno estas multaj grandiozaj akvofaloj pendantaj sur mar-eroditaj klifoj 200 m. altaj. Unika karaktero de tiu parko estas la sovaĝa naturo neŭŝita de homoj. Ĝi prezentas ĉie okulfrapajn scenojn de kalderalagoj, virgaj arbaroj, diversaj alpaĵ floroj kaj amasoj da marbirdoj.

AKAN NACIA PARKO: Kuŝanta en la orienta parto de Hokkajdo, tiu nacia parko kun areo de 87,498 ha. montras modelojn de vulkanaj aktivecoj, kiuj meritas tutmondan atenton. Preskaŭ la tuto de la parko estas okupita de vulkanoj akompanitaj de du grandaj kalderalagoj Akan kaj Kuĉĉaro. Inter aliaj lagoj troviĝas impone mistersajna lago Maŝuu, kies akva trevidebleco estas 41.6m., la unua rekordo konata en la mondo. La grandioza pejzaĝo kun elstaranta O-Akan, fumantaj vulkanoj Me-Akan kaj Ioo, havebla sur montpesejoj Bihoro, Sempoku kaj Altebeno Sokodaj, estas eterna memoro al la vizitantoj. Tiu parko estas precipe favorata de bunta aŭtuna foliaro de malfrua septembro ĝis novembro.

UAKKANAJ(=WAKKANAI, 55,000 enl.) sur 45.5°N., la plej norda ekstremo de Japanujo, estas pitoreska havenurbo servanta kiel bazo por nordmara fiŝkaptado. Sur la belvidejo de Kabo Sooĵa(Sōya), proksima al la urbo, staras monumento por la memoro de Mamiĵa Rinzo, la unua esploriginto de Hokkajdo en ĉ. 1800, tomboj de Ajzu-klanaj samurajoj, kiuj falis kiel lingardantoj, statuo de hundoj saĥalinaj, kiuj mortis en servo por antarktekspedicio en 1955, kaj multaj aliaj historiaj objektoj de tiu mal-

proksima landlima angulo. Ankaŭ ŝipoj al ĉisubaj "Nordaj insuletoj" veturas de tiu haveno.

NORDAJ INSULETOJ: Apud Hokkajdo troviĝas pluraj insuletoj sur norda maro furioza en vintro. Lavataj de fortaj marondegoj, ili havas unikan karakteron en sia sovaĝa naturo.

INSULETO RIŜIRI, kuŝanta sur la maro koccidenta de Ŭakkanaj, estas fama pro la bela Monto Riŝiri-Fuĵi kaj Himenuma, ĉarma lageto en apuda arbaro.

INSULETO REBUN estas formita de montetoj, sur kies klifoj troviĝas diversaj alpaĵ floroj.

INSULETO TEURI estas konata pro la amasoj da marbirdoj.

INSULETO JAGIŜIRI formas naturan ĝardenon kun la onko-arboj (taksusoj), ĉie en la insuleto kreskantaj.

KIEL ATINGI AL HOKKAJDO

Fervoje: La Japana Nacia Relvojo (JNR) donas oftajn servojn inter Tokio kaj Sapporo kun ŝipo inter Aomori kaj Hakodate. Ekspresoj kun rezervitaj seĝoj estas oportunaj; Ueno en Tokio - Aomori, 10 h. 25 min., Aomori - Hakodate, 3 h. 50 min., kaj Hakodate - Sapporo, 4h. 30 min.

Fluge: Kelkaj aertrafikaj entreprenoj servas inter Tokio kaj Sapporo per oftaj flugoj. Ankaŭ inter ĉefaj urboj en Hokkajdo oni servas. Bonvolu turni vin al Japana Turista Buroo (JTB).

* * * * *

VORTOJ DE S-RO SIDOROWICZ (Daŭrigo de p.27)

4) 自分の言葉で、紋切り形でない自己紹介を!

En renkontiĝo solena aŭ malsolena japano diras la nomon, antaŭnomon, kaj diras la aĝon, kaj poste ke li estas komencanto, kaj tio estas en ordo, do li ne progresas en nia lingvo, ĉar sufiĉas. En Eŭropo estas kutimo, ke dum la bankedo oni parolas ... kaj parolas ne prezentante sin, tute ne parolas pri sia nomo aŭ antaŭnomo, neniom parolas ke mi estas tiu kaj tiu, kaj ne pri aĝo. Mi staras kaj parolas pri io ajn mi volas, aŭ faras toston je la sano de mia dekstra belulino aŭ la sano de mia maldekstra najbarino --. Kaj mi parolas pri sia beleco evidente, tio estas parolado en la bankedo.

S-ro T. Takahashi skribas pri sia nova loĝejo

昨年末のザンホフ祭を最後に北海道を去った S-ro
高橋達治(前 H.E.L. 事務局長)は 55 回日本大会のため再び来道
の予定ですが、D-ro 山賀あてに寄せられたたよりを一部紹介
します。猶 発行日は 1 月 28 日です。

Mi atingis tien ĉi je la 28-a de la lasta jarfino kaj
jam forpasis ĵus unu monato--kia rapida forpaso de la
tagoj! La Simizu Marista lernejo, mia laborejo, estas
nove konstruita, granda kaj luksa lernejo kun multaj
ĉambroj kaj lernas 185 lernantoj.

La loĝejo estas sufiĉe granda domo por miaj familianoj.
Ĉi havas 7 ĉambrojn en 36 cubooj kaj ~~tro~~ troviĝas multaj
arboj en ĝardeno de 150 cubooj, --persiko, persimono,
kaj du specoj de oranĝoj(nacu-mikano kaj daidai)-- kaj
multaj pinarboj, ĉar ĝi estas en la daŭro de Miho-no-
macubara. Sur la ĝardeno kovras gazono kaj troviĝas
balancilo kaj pend-ludilo kaj aliaj malnovaj ludiloj
kiuj ĝojigas miajn gefilojn.

Estas tre varme en tiu ĉi loko. Dum la tago temperaturo
mezuras 20 centi-gradojn kaj plie brilas la suno en
verando(engawa) kaj mi povas ĝui varman sunradion same
kiel en majo en Otaru, sed dum la nokto estas iom mal-
varme (4 aŭ 5 gradojn) kaj mi ne povas esti sen mal-
granda portebla petrolo stovo, ĉar mi jam kutimiĝis sidi
apud varmega stovo en Otaru.

De antaŭ mia domo, mi povas vidi belegan montegon
"Fuĵi" kiu kovras sian pinton per blanka neĝo. En la
malvarma mateno mi rigardas la pinton por distingi neĝan
ventegon. Ĉar tiu blovo sciigas al mi malvarmegan veteron
en la norda lando kaj mi kare rememoras vivon en Otaru--.

Mi kore esperas al vi ĉion bonan en la nova jaro, kaj
deziras revidi vin en la ĉi jara kongreso.

"Vortoj de S-ro Sidorowicz"

少し古い話(1年前)にが Pola sanideano Sidorowicz は各地を廻って、大いにしゃべりまわっていた。'65年の世界大会の印象がうすれてきた時、再び「活きた」ESP会話にふれ、LIK経験者にとっても、未経験者にとっても、大きな刺激だった。かなり耳の痛いこともしゃべっていたが、Magnetfonoに記録されているもののうちいくらかをとり、Sidorowicz 語録をつくってみる。

1) イスパラントだけで話す決意を固めよ。

"Estus bone, se vi faros fortan decidon paroli dum viaj renkontigoj nur esp-e, se vi tion faros, vi certe progresos, kaj certe akiros la liberon de la parolo, de la parolata lingvo sam-grada de S-ro B--"

2) ねばりと努力なくして奇蹟は起らぬこと。

"Neniam miraklo okazas en la mondo, se oni devas akiri per propra peno, propra laboro kaj obstineco. Por lerni Esp. bezonas certa obstineco, ĉiutage, se ne paroli, almenaŭ legi."

3) 日本のイスパラント雑誌(?)なんか読めやしない。

"Japanaj respondeculoj de esp.-movado tre bagatele traktas la problemon de skribita lingvo kaj ili disvastigas inter geesp-istoj junaj publikaĵojn pri Esp. sed ne per Esp. Estas multaj publikaĵoj en Japanujo, kiujn mi trovis, sed mi povis nur rigardi sed ne legi, ĉar ili skribas nur pri Esp. sed ne per Esp., -- . Mi havas ĉi tie malbonan ekzemplaron Orienta Revuo ----"

なるほど外国人からみれば不満はもっともだろう。ハンガリーポーランド等の Esp-a gazeto に比べ、R.O. など母国語の % が格段に大きいのはたしかだ。彼の babilado は夏につづくが, spaco mankas. 以下 25 頁につづく。

KASRAPORTO de HEL (会計報告)

① 前回 (N-ro 37) 報告残高

30,840^円

収入 Disciplinado 会費 18,100^円

HEL 会費

札中星 12名 x 300 3,600

(永田明子, 菊部利一,
伊藤玲子, 畑中精吾
藤井重雄, 東三郎
今村雅子, 川口嘉孝
沢谷雄一, 佐々木健
依谷絹代, 井ノコミル)

割小収 76 x 300 2,100

(星田淳, 星田文子,
末沢邦夫, 木村洋子,
菊池彩乃, 船橋佳一,
小林二男)

小樽 6名 x 400 2,400

(小泉茂子, 横山康勝,
山賀勇, 江口音吉
早川昇, イングロミル)

由仁 新田爲男 400

広尾 山野喜美子 500
(金庫 100円)

不明 10

② 収入計 27,110

支出 55回大会へ貸出し 10,000^円

LEONTODO N-ro 37 12,000

通信費 (S-ro 高橋振分) 2,000

〃 (Disciplinado) 160

Disciplinado 肖像

本誌へ支払レ 16,855

紙, マック 100

リコピー用紙 363

③ 支出計 41,478

差引残高

① + ② - ③ = 16,472^円

内訳

振替口座) に 3,400^円
小樽 8703

割小収事務局の

郵便貯金に 13,072^円

【編集後記】 大会準備はあるにしても、機関誌は出さねば...との皆さんの意見で、こんなものが出来ました。原稿が全々なく、Tomakomaijanoj のみでデコ上げた結果となりましたが止むを得ません。北海道大会のあと、6月中に1度出し、あとは日本大会に全カーと考えています。場合によっては指名して原稿をお願いすることになるかもしれません。LEONTODOをHELみんなのものとして育てるため御協力下さい。(AH)

Enhavo de ĉi tiu numero

p.1. 次才に具体化する大会準備

2. 5月には札幌と小樽でー

3. 第32回北海道大会、会員消息

4. 「ウチルボレーの生涯と死」対談

Trad. Osamu Nada

12. 由比さんのおもいで

星田淳

14. Reveni は「帰る」ではない!

Osamu Nada

15. Ĝis la "原主花園"

18. Hokkaido (Turisma gvidlibro)

26. S-ro T. Takahashi skribas pri sia nova loĝejo...

27. "Vortoj de S-ro Sidorowicz"

(Doktrigoj en paĝoj 25, 17)

28. Kasraporto de HEL (会計報告)

編集後記

LEON TODO N-ro 38

発行：1968年5月4日

発行者：小樽市花園東3-11 山賀勇次郎

北海道エスぺラント連盟

編集：苫小牧市王子西部2区56号 星田淳